SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA


REDAKTEJO, ADMINISTREJO K SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO: 67, avenue Gambetta, Paris-20
Poŝtĉekaj kontoj je nomo de SAT-Paris: Bruxelles n-o 350 189, S'Gravenhage n-o 211 533 Kopenhago n-o 4 986, Paris n-o 1234 22, Stokholmo n-o 74 153, Wien n-o D-109 068, Zagreb n-o 41 448, Zürich n-o VIII-200 49. Alilande oni pagu per poŝtmandato je nomo de SAT., bonvalutaj devizoj en rekom. letero aŭ bankĉeko je nomo de « Bannier ».

Roterdamo, la kongresurbo por 1937

Kvankam la nunjara kongreso okazis nur antaŭ kelkaj monatoj, kvankam la jaro 1937 ankoraŭ ne sin anoncis, tamen Roterdamo jam nun aŭdigas sin por senprokraste komenci altiri la atenton de ĉiuj SAT-anoj k de ĉiuj lab. esperantistoj.

En Roterdamo do okazos la 17-a kongreso de SAT, almenaŭ se la mondo ne ankoraŭ plifreneziĝos, se la mondo ne estos grandega sangejo, kie homoj plej kruele ĉesigos la vivojn de aliaj homoj, kie homoj, ne konante unu la alian, murdos sin reciproke pro naciisma freneziĝo, la kronika malsano de ĉi tiu kapitalismo.

Jes, se okazos venontjare ĉi tiu katastrofo, tiam la Roterdama O. K. K. estos senpova, tiam ĝi eble renkontos la eksterlandajn samcelanojn en aliaj cirkonstancoj, sur aliaj lokoj, tro teruraj por eĉ pensi al ili.



Gek-doj, ni esperu, ke io tia ne okazos! Ni faru ĉion eblan por eviti ĉi okazontaĵon; sed domaĝe, ni ne multe povas kontraŭagi, ĉar nia potenco estas eta, prudentaj vortoj ne estos aŭskultataj, noblaj agoj rigardataj kiel ŝtatperfido.

Tamen, tiom pli nia tutmonda organizo laboras en tempo, en kiu ĝi **povas** labori, tiom pli nia SAT-movado penadas liberigi siajn membrojn de ideoj, altruditaj al ili de iliaj registaroj pere de gazetaro, radio, filmo ktp.

SAT laboradas por kreskigi ĉe la membroj la sentojn de Homeca solidaro. La kongresoj estas grava parto el tiu kultura, hominda tasko ĝia.

En niaj kongresoj ni sentas milfoje pli la frenezon de la naciaj militoj ol inter niaj samnacianoj. Jes, eble **nur** ni plene konsciiĝas pri la krimeco de la milito k ĝiaj preparoj, kiam ni en niaj kongresoj, diskutante en unu lingvo, sidas brak-ĉe-brake kun homoj el aliaj landoj, sed kiuj, pro tio ke ili parolas la saman lingvon, ŝajnas al ni esti samurbanoj.

Tial la Roterdama O. K. K. instigados la SAT-anaron veni al Roterdamo, centre lokita grandurbo. Gi propagandos por la 17-a kongreso de SAT ĉiamaniere k ĉiuloke. Kaj malgraŭ tio, ke la tempo por tutmondaj kongresoj, precipe laboristaj, ĉiam pli malfavoriĝas, ĝi tamen ne lasos sin timigi de pesimismaj antaŭdiroj k plene fidas al la sukceso de la 17-a SAT-kongreso, okazonta en Roterdamo. Tiu sukceso kompreneble nur povas realiĝi, se la SAT-anoj k tiuj lab. esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al SAT, tute konsciiĝas pri la gravo de tutmonda kongreso esperantista. Car de tiu konsciiĝo grandparte dependas ilia veno al la kongreso.

Ni bone scias, ke ankaŭ aliaj gravaĵoj ludas grandan rolon: la bezonata mono, libertempo k.s. Sed se ni nun jam faras planon viziti la 17-an SAT-kongreson, ni havas multajn monatojn por ŝpari iom da mono k por klopodi akiri ferion en la komenco de aŭgusto.

La O.K.K. aparte atentos la gastigadon de la partoprenontoj k plej verŝajne al ni eblos gastigi ĉiujn ĉe esperantistoj, ĉar la venontan jaron certe estos en Roterdamo pli ol mil laboristaj esperantistoj. La kongresanoj do senkoste aŭ kontraŭ malgranda kompenso povos gastadi ĉe samcelanoj. Ili do povos eviti la multekostan hotelvivon.

Ni devas konfesi, ke Roterdamo ne estas urbo, kiu povas konkuri kun urboj ĉe la Riviero, Parizo aŭ alia metropolo rilate belecon. Gi estas ordinara havenurbo kun preskaŭ 600.000 loĝantoj. Gi estas ligita kun Germanio per la rivero **Rejno,** kiu ĉe Roterdamo nomiĝas **Maas.** La ĉirkaŭaĵo de la urbo ne estas monteca nek arbara, sed tamen pitoreska. La distanco inter Roterdamo k la Norda maro estas 23 kilometroj. Kiuj do ŝatas viziti la strandon k la nederlandajn banlokojn, certe trovos okazon. Sed ni estas konvinkitaj, ke la SAT-anoj ne venos al ni speciale por turistaj ĝuoj. Tial ni ne ŝatas fanfaroni pri la vidindaĵoj de nia urbo, ne ŝatas vin logi per gigantaj havenoj.

Ni scias, ke en kamaradeca medio la mondo ĉiam estas bela.

SAT-anaro tutmonda! ni nun jam laboras por inde akcepti vin en Roterdamo. Faru do viajn planojn k vizitu la 17-an kongreson de SAT!

Por la O.K.K. — B. W.

La sekretaria adreso de l'O. K. K.
estas:

K-do C. v. ESSEN

Westerbeekstr. 57,

Rotterdam -Z., Nederlando.

Verda Monato en Nederlando

Antaŭ du jaroj la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo decidis proklami septembron Verda Monato. En tiu monato la propagando por esperanto k la okazontaj kursoj aranĝiĝas laŭ speciala programo, k estas do eble koncentrigi la agadon en la tuta regiono, tiel ke ankaŭ la atento estas pli granda k la intereso vekita. La varbadon tio tre faciligas k estas en la rezulto certe rimarkebla.

La propagando okazis en la lastaj jaroj ĉiam pli grandskale. Por la nuna jaro ni aperigis 2 broŝurojn en kvanto de 15.000, el kiuj unu speciale verkita por la junularo. Ni eldonis 5000-ekzemplere afiŝon en tri koloroj, kiuj pendas malantaŭ multaj fenestroj; krome 200.000 sigelmarkojn por glui sur la korespondaĵojn, 100.000 faldprospektojn dukolorajn (bildoj kun rimoj) k 800.000 flugfolietojn. Okazas dekoj da ekspozicioj en multe da lokoj, kunvenoj, ktp.

Ĉiujare ni vendas ĉ. 5000 lernolibrojn. Tio signifas, ke tiom da kursanoj komencas la lernadon.

La propagando cetere estas subtenata de multego da gazetarikoletoj en granda nombro da ĵurnaloj k ĉiaspecaj gazetoj. Ne malpli valora estas la radio. Jam dum kelkaj jaroj nia Federacio havas la okazon regule alparoli dek milojn da aŭskultantoj, dum la lastaj du jaroj dufoje monate dum 15-30 minutoj. Ne nur funkciuloj de la Federacio, sed ankaŭ sindikatestraranoj, partigvidantoj k personoj el diversaj rondoj venas antaŭ la mikrofonon favore al esperanto. Ekz. la ĝenerala direktoro de la P.T.T., kiu tre favoras esperanton en poŝtistaj rondoj, paroladas por ni same kiel parlamentanoj. Tio povas okazi, ĉar en Nederlando la laboristaro posedas propran radioorganizon (VARA) havanta duonsemajnan elsendotempon. Ne nur parolantojn ni invitas, sed ankaŭ kantistojn k kantĥorojn. Jus ni ricevis la informon, ke **depost sabato, la 3. oktobro,** ni denove dum duonjaro povas disponi pri la elsendotempo **ĉiun duan sabat-tagmezon.**

Grava progreso estas cetere, ke la plej granda laborista ĵurnalo (social-demokrata) « Het Volk » k « Voorwaarts » k ties provincaj eldonoj (entute ĉ. 150.000 abonantoj) invitis nin prizorgi poresperantan rubrikon dufoje semajne (amplekso de 3/4 kolono). Specimenon de tiu gazeto ni volonte sendos al petontoj. Pasis jaroj, antaŭ ol la redakcio, post centfojaj petoj k proponoj, eĉ pere de kongresrezolucioj de la soc. dem. partio, decidis la enkondukon de tiu esp. rubriko.

Novaĵojn k ĉion, kio estas taŭga por tia rubriko, ankaŭ librojn por recenzi, oni sendu al redakcio de tiuj ĵurnaloj. Adreso: **Redakcio Arbeiderspers,** Esperanto-kolono, Hekelveld, **Amsterdam-C.,** Nederlando.

PRO NURA AMATORECO

Kontraŭ simpla leterafranko mi transprenas la korektadon de viaj skribaj ellaboraĵoj. Kune kun bonaj konsiloj k sugestoj vi aldone ankaŭ ricevos mian periodaĵon: « Tutmonda leterkesto ». Adreso: CARL FRANZMANN, Hotelo « Groesbeek », Groesbeek apud Nijmegen (Nederl.).

Vivofazojn de proletaj infanoj k junuloj vi trovas pripentritaj en

JUNECA ARDO

Rakonto de N. BARTELMES.

120 paĝoj. Form. 14 × 19 cm.
Prezo: 9.— fr. fr.
SAT-eldono.

Deklaro de aprobo

Vidante la nunan disvolviĝon de l'aferoj en Sovetio, t. e. ke la gvidaj elementoj potencaj tie, pli k pli celadas konformigi la socian strukturon de tiu giganta lando al la burĝaj soci-strukturoj — komunikoj k faktoj troviĝas tiel en burĝdevenaj artikoloj, kiel en socialism-tendencaj — ankaŭ la artikolo : « La nova familia kodo en Sovetio » (Senn. Revuo, aŭg-sept. 1936) nedubeble atestas pri tio, — mi gratulas tiel la P.-K. pro ĝiaj komentoj pri la enhavo de la « publika letero » en « S-ulo » (aŭgusto 1936), subskribita de Kolĉinski-Ĥarkovo, kiel la 16-an Kongreson de SAT pro la unuanime akceptita rezolucio en tiu Kongreso. Ĉar, nur per firma gvidlinio subtenata de ni ĉiuj, la afero de la tutmonda laboristaro estas helpata, ne per daŭraj devioj k hipokritaĵoj, konscie aŭ ne faritaj.

J. Bout (15.396), sekretario de K. K.

Eminenta lingvisto, amiko de esperanto, mortis

Fine de septembro mortis profesoro **Antonio Meje** (Meillet), unu el la plej eminentaj nuntempaj lingvoscienculoj, en aĝo de 70 jaroj. Meje studis ĉe la universitato de Parizo literaturon; en 1891 jam li fariĝis stud-direktoro ĉe la Lernejo de Altaj Studoj. De 1899 li profesoras ĉe la Franca Kolegio. De 1902-06 li instruis armenan lingvon ĉe la Lernejo de Orientaj Lingvoj. En 1919 li estis elektita membro de l'Akademio de Surskribaĵoj.

Meje ne nur « rekonstruis » la antikvajn lingvojn, sed deduktis el tiu studlaboro la filozofion pri lingvistiko. Li evidentigis unuparte la principojn de lingva disvolvo k, aliparte, la historiajn k sociajn kondiĉojn, kiuj estigis la aparten karakteron de ĉiu lingvo. Resume, li montris la rilatojn, kiuj ĉiam ekzistas inter la lingvo de popolo k la popolo mem.

Lanti citas el verkoj de Meje en sia « Naciismo » k en « La Laborista Esperantismo ». En « La Lingvoj en la Nova Eŭropo » tiu aŭtoritatulo ja skribis: « La eblo starigi **artefaritan** lingvon, facile lerneblan k la fakto, ke tiu lingvo estas utiligebla, estas pruvitaj per la praktiko. Vana estas ĉia teoria diskutado: esperanto funkciis. » Kaj konklude: « Nur **artefarita** lingvo povas doni al la internaciaj rilatoj la praktikan k simplan ilon, kiu mankas por ili. »

Ni utiligu en nia propagando tiun ĉi valoran opinion de scienculo, kiu meritas dankeman memoron ĉe la esperantista popolo.

POST LA REUNUIĜO EN FRANCIO

Certe interesos multe la Gek-dojn ekster Francio ekscii, kiel disvolviĝas la laboro en la nova unueca organizo F.E.T. Kompreneble estas tro frue por juĝi pri la rezultoj sur la propaganda kampo, ĉar ja la kurs-sezono nur komenciĝas.

Pri tio tamen oni jam povas klare paroli, kio rilatas la aplikon de l'laborplano de la nova Federacia komitato. Nu, mi devas konstati (k neniu povos alporti dementon pri tio), ke ĝis nun, en **ĉiu kunsido** de la Komitato, kelkaj anoj de l'iama FEP (IPE-sekcio) provas trudi sian vidpunkton al la aliaj. Ĝis nun, komence de oktobro, nenio estis farita por plenumi la ĉefan taskon de F.E.T.: propagandi esperanton; ne aperis en la gazetoj reklamo pri nia perletera kurso, k aliaj propagandaj entreprenoj; sed mi spertis, kiel kelkaj IPE-anoj sisteme celas trudi taskon al la Federacio, kiu ne estas ĝia (kreo k financado de esperantlingva tradukserva bulteno, do PEK-bulteno).

Tiuj proponoj venas insiste, plurfoje, kvankam la unueco okazis nur sekve de tiu ambaŭflanke akceptita kondiĉo, ke la Federacio okupu sin ekskluzive pri propagando k instruado. La laboroj de l'komuna komisiono preparinta la unuecon, ja nur pro tio sukcesis, ke IPE-anoj **rezignis** je sia postulo fari PEK-laboron **sub la aŭspicioj de F. E. T.** (same kiel SAT devis rezigni siaflanke pri la Gotenb. Konvencio sekve de l'likvido de F.E.O.).

Sed hodiaŭ kelkaj IPE-aj komitatanoj voĉdonis por aperigo de fantazia artikolo pri PEK k favore al esp-lingva bulteno eldonota sub aŭspicioj de F.E.T. k eĉ... redaktotan de la **federacia sekretario!** Ni SAT-fidelaj komitatanoj fiaskigis la aperigon de l'koncerna artikolo en la asocia organo. Sed la danĝero, ke polemikoj en la mezo de l'komitato k konsekvence en la vicoj de l'federacianoj malebligos fruktedonan laboradon, estas reala.

Ne sufiĉas unuigi organizojn, se oni ne povas krei firman bazon por harmonia kunlaborado en la nova unuec-organizo. Ne sufiĉas ĉiam **paroli** pri unueco: pli utilus **agi** unueceme. Ni akceptu ĉion, kio povas unuigi, ni forĵetu ĉion, kio povas malunuigi. GLODO.

Nederlandano plendas pri korespondado

Antaŭ sufiĉe longe oni povis legi plendon pri korespondado en « S-ulo ». Ĉar la korespond-tempo jam estas proksima, mi ripete al la antaŭa artikolo skribas ĉi tiun plendon nome de multaj K-doj. Mi demandas: « Kia estas la kaŭzo, ke tiuj, kiuj sin anoncis respondpretaj per noteto: **Respondo garantiata,** aŭ io simila, tamen ne plenumas tion? Ili prefere forlasu tian aserton. Ofte ni spertis k -as, sendinte PK aŭ leteron eĉ kun bildkartoj, ke ni ricevas eĉ ne unufojan respondon. Ĉiu senlaborulo scias, ke estas tasko tre malfacila ŝpari kelkajn monerojn por af-

Saluto de l'esperantista kolonelo Mangada al la Valencianoj

La sekvanta salutskribaĵo, kies aŭtografon ni reproduktas, estis sendata al la batalfronto de Guadarrama de la konata respublikana kolonelo Julio Mangada Rosenörn, *prezidanto de l'Hispana Esperanto-Asocio, al la Laborista Esperantista Grupo de Valencio, responde al ties saluto transdonita al li persone de esperantista milicanoj batalantaj en lia regimento. La aŭtografo aperis unue en la Valencia popolfronta gazeto « Verdad » (n. 19).*

Navalperal la 15an de Aŭgusto-1936

Tre karaj samcelanoj: Ĵus mi esprimis al mi viam fratan saluton; de ĉi tie per ondoj de libera vento, mi sendas al vi ne nur unuan fratan saluton, sed samtempe unuan koran fortan brakpremon. Antaŭen al nia absoluta Triumfo! Saluton! Kore via

Julio Mangada Rosenörn

Bilanco de la 16-a SAT-Kongreso

ENSPEZOJ	
Pruntoj	24— 0— 0
Aliĝoj	51— 9— 8
Vendado de materialo	16— 9— 2
Profito de la Bufedo	7—14— 2
Donaco de T. U. C. (Sindik. Unuiĝo)	10— 0— 0
Aliaj donacoj	8— 0— 1 1/2
Reklamoj	7— 9
Div. gajnoj	18— 0
Bankprocento	3— 3
Flugfolioj (Klubo)	10— 0
B. B. C.	11—17— 0
	£ 131— 9— 1 1/2

ELSPEZOJ	
Kongreseja luo	25— 0— 0
Presaĵoj (leterpapero, afiŝoj, aliĝiloj markoj, ktp.)	24— 6— 1 1/2
Kongreslibro	12— 5— 0
2.854 poŝtkartoj	8—11— 3
Reklamo	1— 2— 9
Poŝt-oficejo	1— 7—10
Kongres-insignoj	6—18— 0
Orkestro	1—15— 0
Poŝtelspezoj	7— 7— 4
Repago de pruntoj	24— 0— 0
Kantistoj	3— 3— 0
Diversaĵoj	2—19—10
Saldo profite al SAT	12—13— 0
	£ 131— 9— 1 1/2

Pri la ĝusto de ĉi tiu bilanco certigas : Frank MILLS, kontrolanto de la SAT-Kongreso.
The Larches-Leigh, la 24. IX. 1936.

Kvitancante kun danko la ricevon de l'profit-saldo de la 16-a Kongreso, ni refoje gratulas la manĉestrajn SAT-anojn pro ilia sukcesa laboro.— La Plenum-Komitato.

ranko k aĉeto de korespondaĵoj. Malgraŭ tio ili oferas volonte tiun penon, se ili nur povas interkontaktiĝi kun eksterlandaj K-doj.

Baldaŭ poste multaj novaj amikoj seniluziiĝas rimarkante, ke respondo ne venas. La atendado estas vana. Kaj kompreneble, ili ekserĉas la kaŭzon pri tio. Ĉu nia esperanto estas nekomprenebla? Aŭ ĉu nia lingvaĵo ne taŭgas? Ĉi-ĉion ili demandas al si mem. Ĝis ili forlasas la tutan aferon, ĉar (iliaopinie) esp-o ne jam estas aplikebla praktike. Ili moke parolus pri nia afero, se la gvidantoj ne farus ĉion eblan por reteni ilin en la grupo.

Ĉu vere la SAT-movado estas superfluita de holandaj korespondemuloj? Tiom grave, ke iu norvega amiko skribis al mi, ke li ricevis kiel respondon al anonco 40 (kvardek) leterojn de holandanoj...? Se tia estas la afero, mi tamen petas almenaŭ unu fojon respondi, aŭ ne aldoni « respondo garantiata », se vi ne volas plenumi, kion vi promesas. Al la redaktoro mi petas fari « nigran liston » de nerespondintoj. Kaj al ĉiuj mi petas forte propagandi k labori por esp-o ĝenerale k por SAT aparte, por ke ne nur en Holando, sed ankaŭ aliloke troviĝu grandnombre niaj SAT-anoj.

G. Kalkman, Vlaardingen.

Komuniko de la Administracio

Francio reduktis la valoron de sia mono ĝis proks. la 2/3, Svisio same, Nederlando malpli, Ĉeĥoslovakio je 16 %, Italio je 41 %. Eble aliaj sekvos. Jen grava problemo por mondorganizo kiel SAT. Se ni juĝus la aferon laŭ pure komercista vidpunkto, ni devus altigi niajn tarifojn laŭ sama proporcio kiel la redukto de la valoro de l'franko.

Tamen, interkonsente kun la P.-K., ni ŝanĝos nek la prezojn de niaj libroj (indikitaj en fr. frankoj ; krom eble 1 aŭ 2), nek la tarifojn de membreco k abono (nur tarifojn de 2 aŭ 3 landoj ni adaptos al la nova situacio).

Detaloj aperos en la proksima n-o de « S-ulo ».

Ni esperas, ke la K-doj ĉie bonakceptos tiun ĉi novaĵon k faros kompense grandajn klopodojn por aĉeti k aĉetigi niajn eldonaĵojn k varbi novajn anojn al SAT!

MANIFESTO

al la Esperantistaj laboristoj

KAMARADOJ! En spirito de unuecemo k frateca atmosfero la 16-a Kongreso de S. A. T., kiu unuigis ĉi-aŭguste en Manĉestro 170 Ge-kdojn el 7 landoj, post fruktedonaj kunsidoj akceptis unuanime, kiel konkludon, Gvidrezolucion spegulantan la rezulton de ĝiaj laboroj. La Rezolucio sugestas al ĉiuj laboristaj esperantistoj en la mondo, tute egale ĉu ili antaŭe apartenis al nia organizo aŭ ne, ĉu ili intertempe organiziĝis en la esperanta movado aŭ ĉu ili staras ankoraŭ ekster ajna organizo, — ke ili ariĝu kun ni en nia unueca organizo S. A. T.

Nia Statuto estas bazita sur larĝa toleremo; ĉiuj klasbatal-tendencaj K-doj estas bonvenaj en niaj vicoj, sen diferenco de partio.

Jam nun S. A. T. havas bonan reputacion tra la mondo, pro sia deksesjara seninterrompa aktiveco sur la labor-esperantista kampo. Ĝi estas konata per siaj du gazetoj k sia Jarlibro, regule aperantaj malgraŭ la kriza tempo. Sed la sukceso de la organizo, la rezultoj de ĝia laboro sur la kultura kampo povus esti ankoraŭ multe pli grandaj, se vi flankirantoj partoprenus en niaj vicoj komune kun ni la klopodojn, utiligi esperanton por la klasaj celoj de la Laboristaro.

Nenian riproĉadon vi aŭdos pri la pasinto, tion ni povas senhezite promesi. Tiun cedon ni pretas fari. Sufiĉas konstati la por ĉiuj malutilon rezultintan el la skismo, por ne voli plilongigi la staton de diseco per neutilaj konsideroj. La pasinto dormu. La nuno staru sub la signo de unueco, de rekunigo de ĉiuj fortoj.

Ni ne malŝatas opozicion en S. A. T. k ne timas la komparan kontraŭstarigon de diversaj vidpunktoj en diskutado; eĉ laŭstatute la libera diskutado estas dezirata. Estas nur unu kondiĉo, nome ke la opoziciantoj apliku lojalajn, honestajn rimedojn k estu sinceraj en siaj paroloj k agoj.

Ni kredas, ke I. P. E. ano aŭ I. S. E. ano, kiu konatiĝas kun la Statuto de S. A. T. ne povas trovi en ĝi eĉ unu solan punkton neakcepteblan.

KAMARADOJ! via loko estas en la vicoj de S. A. T. — Ne rifuzu la manon fratece etenditan al vi en Manĉestro!!!

LA PLENUM-KOMITATO DE S.A.T.

Tra la esperanta gazetaro

Malofte ni spertis, ke en la someraj monatoj elpaŝas novaj batalantoj sur la mondtribunon esperantistan. Ĉi-jare ni povas tamen kronike registri tion. K-do Zavada, iama prizorganto de la kooperativa fako en SAT, intertempe delonge perdiĝinte el la vicoj de nia anaro (ni verdire ne scias pro kia motivo) kreis internacian kooperativan gazeton, nomatan « *Cielarka Standardo* » (adreso : « Spolnota Pracy », *Warszawa*, ul W. Gorskiego 6.) Unua n-ro (aŭgusto) 16-paĝa ; promesita periodeco : monata. Formato : 19 × 27 cm. Abonprezo : 5 sv. fk. jare. Programo de l'gazeto : grupigo de ĉiuj aktivaj kooperativanoj-esp-istoj ĉirkaŭ la gazeto k disvastigo de esp-o, dank' al ilia kunlaboro, en la kooperativa movado. La artikoloj en la unua kajero rilatas al la koop. movado, ĉu idee, ĉu informe. En la artikolo pri ĝisnuna apliko de esp-o en la koop. movado J. Z. forgesas mencii la artikolseriojn, kiuj aperis en la jarkolektoj de la SAT-gazetoj (ekz. pri la koop. movado en Svedio kc).

« Ĉinio Hurlas » estas okpaĝa informilo (form. 19 × 27), monata, pri vivo, batalo k naciliberiga movado de l'ĉinoj. Komunistaj agitvortoj. Alvoko de kongreso de « Tutĉinia Federacio de Naciliberigaj Organizoj » por malfermi okulojn pri la japana imperiismo, kiu « intencas ekigi kontraŭsovetian militon utiligante Ĉinion kiel bazon », ktp. Abonejo : S-ro *A. Griven*, No. 14, Lane 169, Carter Rd., *Shanghai*. Prezo : jare 3 resp. kuponoj.

« La Vojo » la monata infangazeto por infanoj el la nederlanda L.E.A., aperis por septembro unuafoje presita tipografie (8 paĝoj, formato 15,5 × 24 cm). La jara abonprezo estas 0.50 guld. (ekster Nederl. 0.65 g.) (1). Kun tiu ĉi n-ro komenciĝas la publikigo de lernolibro por infanoj « La Malgranda Mondo » (kun bildoj), verkita de K-dino *A. Rebers*, laŭ aparte taŭga metodo. Tre plaĉe prezentita revueto por la plej junaj inter nia anaro.

PRI ESPERANTIGO DE PROPRAJ NOMOJ

En « Nia Gazeto » (n-o 8/9) plaĉas al s-ro Bukon (Boucon) ataki la SAT-anojn, kiuj esperantigas sisteme ĉiujn proprajn nomojn, pro jena principo : ne estu enŝovitaj en esperantlingva teksto nacilingvaĵoj. Se Bukon nomas tiun sistemon « kripligo », ni povas kun pli bona pravo aserti, ke la mikslingva teksto estas kripligo, nome al nia pura esperanta lingvo, kiu ne enhavas la literojn « x, y, ö, ü » kc. Cetere, oni ne forgesu ke por la propraj nomoj el lingvogrupoj, kiuj ne havas la latinan alfabeton (ekz. rusa, japana, ĉina, k. a.), alia solvo tute ne eblas : oni devas transskribi ilin fonetike per la literoj de la esperanta alfabeto. Kial ne fari tion ĝenerale, aplikante tiel la plej simplan k logikan regulon ?

LA « NEŬTRALECO » EN PORTUGALIO

Ne temas nun pri la sinteno de l'portugala registaro rilate la hispanajn batalojn : temas pri la sinteno de la sufiĉe novdata esp. gazeteto eldonata sub la titolo « Portugala Esperantisto » (kiun ni jam menciis en tiu ĉi rubriko). Naskita en prol. esp-ista medio, ĝi devis esti la — severe neŭtrala — propagandilo k instigilo de l'div. esp. grupiĝoj (esence prolettendencaj) ekzistantaj en Portugalio. Nu, niaj SAT-K-doj devis konstati, kiel vidiĝas el protest-artikolo aperinta en la *esperanto-paĝo* de « *A Vidal Social* » sub titolo « Kontraŭ la skism-agado », ke « P. E. » servas al atakoj kontraŭ SAT ! La gvidanto de « P. E. » profitas ĉiun okazon por montri sian simpation al IPE. Pro tio publike protestas niaj multnombraj K-doj k amikoj de SAT en Portugalio.

(1) Administracio : Postbus W. 6, Amsterdam.

POR FINŜTOPI LA BREĈON

En la *Proverbaro Esperanta* kompilita de d-ro Zamenhof laŭ simila verko de lia patro, oni trovas ankaŭ la frazon : « Kiu bone ŝmiras, tiu bone veturas ». Nu, oni povas apliki tiun ĉi proverbon al la SAT-ĉaro. Ĝiaj radoj bone moviĝas, se ili estas bone ŝmiritaj. Se la malo okazas, ili dolorige skuas la veturantojn.

« Tro da bono ne turmentas », — tion komprenis jam pluraj Gek-doj, kiel ekz. tiu SAT-ano n-o 55, kiu malavare kontribuas al la financa sanigado.

Bonfartas SAT, se ŝmirita la rad'. Helpu do ŝmiri la veturilon, alportante eĉ nur iomete da grasaĵo...

Dankon al ĉiuj radŝmirintoj !

49. LISTO

SAT-ano 55	fr. fr.	400.—
J. Martinez, S. Pont		5.—
H. Andersson, Södertälje		19.50
Ernst Erikson, Stokholmo		19.50
Erbaro, Paris		15.—
Delftano		11.—
H. de Broer, Roterd.		10.—
J. Kram (18.268), Amsterd.		25.—
Kamparanino		50.—
F. Calvez, Guengla-Plage		10.25
Malmö-a SAT-Rondo	sv. kr.	10.—
J. Lenormand, Vitry-aux-Loges	fr. fr.	10.—
17.011	guld.	1.19
K-doj el « Esperio »	fr. fr.	10.—
Kamans, Heerlen	guld.	1.—
Sterken, Heerlen	»	0.50

En Portugalio la esp. movado estas malpermesita

En septembro ĉiuj esp-istaj societoj (en Lisbono estis 4) el Portugalio estas fermitaj, la ejoj sigelitaj k po unu policisto tage k nokte deĵoras antaŭ la pordoj. La kaŭzo de l'malpermeso estas, ke el Barcelono estis dissendata en esp-o alvoko al la portugalaj esp-istoj, por ke ili ekagu kontraŭ sia registaro. Oni ankaŭ rakontas, ke inter la ribelintaj maristoj troviĝis esperantistoj.

EN NIA MOVADO

BRITIO. Bethnal Green Men's Instituto k la Londona Esp. Federacio kunlaborante organizis tre sukcesan foiron k ekspozicion ĉe la Instituto sabate, la 19an de sept. Inter la ekspoziciaĵoj estis la tipografista ekspozicio montrita ĉe la SAT-kongreso, ekzempleroj de PEK-laboro, fotoj k informoj pri la Manĉestra kongreso ktp. Budoj de SAT- k BEA-literaturo altiris multan atenton. Foir-ludoj organizitaj de la taksiistoj gajigis la ĉeestantaron, kiu ankaŭ ĝuis programon de dancoj, kantoj k amuzaĵoj. La vespera kunveno estis plensukcesa. La urbestro, parlament-reprezentanto, prof. Forsajte k reprezentanto de la Londona Urbkonsilantaro parolis.

Ĉe la Londona SATEB-kunveno K-dino *Moon* (adreso : 12 Aldborough Road, *Ilford*, Essex) estis elektita Peranto por londonaj aferoj. Nenion oni sendu al la klub-adreso pro necerta livero, sed nur al la nomita adreso de l'peranto.

Manĉestro. Ni ne kredis ke tempo venos, kiam ni estus ĝenataj per tro da lernantoj. Tamen tio vere okazis ĉe ni dum la unuaj semajnoj postkongresaj, kiam nia ĉambro ne estis sufiĉe granda por enteni la nombron da personoj, kiuj deziris lerni. Post iometa konfuzo ni sukcesis ĉion ordigi, k estis aranĝitaj ses kursoj, el kiuj tri unuagradaj, du mezgradaj k unu supera. Sen ia dubo la kongreso firmigas k fortigas nian Klubon. (Laŭ SATEB-bult.)

NEDERLANDO. La Roterdama FLE-distrikto ekskursis la 13-an de septembro al Delfto. Preskaŭ 200 esp-istoj partoprenis ; oni aranĝis kolekton por la venontjara SAT-kongreso. (10 512).

SVEDIO. La Malmö-a SAT-Rondo kunvenas regule ĉiumonate, kun lekcio aŭ parolado pri iu laborist-tendenca temo. Ĉiam sekvas tre vigla diskuto.

Amsterdamaj SAT-anoj ! Sabatvespere, la 14-an de nov., kunveno en la nova ejo de sekcio 5-a, v. Kinsbergenstr. 28 (West). Ĉies devo estas ĉeesti. Ankaŭ ne-SAT-anoj estos bonvenaj. Atentu la sciigon en « L. E. ». (Perantino H. O. B.)

LETEROJ DE HODLER (1)

Leysin, 9.2.20.

Al S-ro E. Lanti, *Parizo*.

Estimata Samideano,

La proteston de la Parizaj membroj de UEA kontraŭ la uzo de « io » mi ne ankoraŭ ricevis. Mi do nur per via lasta letero eksciis ĝin.

Tiu « protesto » *ne* sufiĉas por ke mi forlasu la novan sufikson, kiu jam estas uzata de sufiĉe multaj bonaj samideanoj, kiel mi povas juĝi laŭ la korespondaĵoj, k kiu estus ankoraŭ pli multe uzata, se oni bonvolus prijuĝi la tutan demandon el vidpunkto praktike-lingva, anstataŭ el mistika vidpunkto. La Fundamento tute ne malpermesas, ke oni enkonduku neologismojn ĉu vortajn ĉu sufiksajn. (« Io » ne plene anstataŭas « ujo », sed nur unu el ĝiaj sencoj). Tion diras la Esp-istoj, responde al la riproĉo de la Idistoj, sed, reale, la egaj konservativuloj agas tute alie, ekskomunikante ĉiun, kiu volas uzi la liberecon allasatan de la Fundamento. Ilia taktiko estas kredigi, ke ĉia ain novaĵo minacas Esperanton je pereo, k kompreneble, kiam oni solene diras al Esp-istoj, ke Esperanto estas minacata je pereo, tiuj ĉi protestas kontraŭ la « pereiganto ». Mankas al la Esp-istaro aŭ pli ĝuste al kelkaj el ĝiaj kondukantoj sufiĉe da toleremo k eĉ konfido je la vera taŭgeco de Esperanto. Ilia agado estas tiu de malfortuloj, kiuj volas anstataŭi la argumentojn praktikajn per ekskomunikoj. Estas necese, ke la progresemuloj ĉesu timi pro tiu « terorismo ». Ili postulu la rajton uzi la *liberecon* allasitan de Fundamento, ne estante traktataj kiel perfiduloj aŭ pereigantoj. Oni instruu la Esp-istaron pri tio, ke Esperanto ne ekzistas nur por ili, sed por la mondo, ke sekve oni havas la devon gin plibonigi, kiam la praktiko tion postulas k kiam tio estas ebla per natura vojo. Mi ja scias, ke « io » estas malgravaĵo, sed ĝia eksperimentebleco estas *principa* demando, de kies solvo dependas, ĉu Esperanto ŝtoniĝos aŭ evoluos. Tre eraras la personoj, kiuj opinias, ke mi enkondukas « io » nur pro persona kapriceto. Kian ajn opinion pri ĝi oni havas, oni verŝajne ne povos nei, ke mi havas kelkan sperton pri la uzado de nia lingvo, kiun mi praktikas jam de dek k kelkaj jaroj. En la Oficejo de UEA mi pli ol iu ajn estis devigata uzi landnomojn — certe pli ofte ol la protestintoj de la Pariza kunveno ! — k jam de longe rimarkis la malpraktikecon de la ĝisnuna sistemo (-ujo, -lando).«Ujo» ridinde

(1) Vidi la unuan leteron en la aŭg. n-o.

C.N.T.-F.A.I. Barcelono

La esp-lingva Inform-Bulteno regule aperas (unu fojon semajne). Adreso : Esperanto-Fako C.N.T.-F.A.I., Via Layetana 34, *Barcelono*. Kiu volas ricevi la Bultenon (senpage), bonvolu kompensi la afrankokostojn : Unu resp.-kupono por 5 sinsekvaj n-oj. Monhelpoj por tiu fako k por la batalo estu adresataj nur al la internacia adreso : A. GANIN, 41, rue Belleville, *Paris 19-a*.

Esperanto-radiodisaŭdigoj E. C. N.-1 Radio CNT-FAI, Barcelono (ondo 41.72 m.), hisp. tempo, lunde 17a ĝis 18a h., *samhore* merkrede, *samhore* sabate.

Frakcia Vivo

PROVIZORAJ GVIDLINIOJ
DE LA KOMFRAKCIO.

La komunistema frakcio en SAT ne plu estas solvenda problemo, sed fakto. Decidvolaj K-doj en Nederlando jam invitas al la K-doj de SAT k de la laŭlandaj lab. esp. asocioj partopreni la vivon k disvolviĝon de la restarigita frakcio.

Ĉar fakte ja temas pri restarigo. De kvin jaroj ne ekzistas komfrakcio en SAT, kvankam ĝi pli frue estis la plej forta frakcio. De kvin jaroj daŭras la evidenta skismo en la lab. esp. movado nacie k internaciskale. Kaj kion oni cetere povas opinii pri kaŭzoj je tiu skismigo — tamen restas la fakto, ke dum k post la Amsterdama kongreso de SAT en 1931 la opozicio kune kun la tiama komfrakcio forlasis SAT k fondis propran organizon IPE k iom post iom la reton da IPE-emaj LEA-oj aŭ t. n. unuigaj komitatoj.

Pri la tiama aŭ nuna pravo de tiuj faroj ne temas tiu artikolo. Laŭ mi estas tute senutile — jes kelkfoje stulte — jaron post jaro diskuti k disputi pri la historio de la skismo. La babilado k miskomprenado ĉesu k ni ekagu. Hodiaŭ ni ne foruzu niajn fortojn en kvereloj, kiuj nur kreas novajn abismojn — sed ni levu niajn okulojn for de la sekaj literoj k vortoj diritaj aŭ skribitaj antaŭ dekoj da jaroj. Rigardu ! Ĉu vi ne vidas, ke la tuta lab. movado k kun ĝi *ni* eniris tute novan epokon? En vico da landoj la laboristaro unuiĝas antaŭ la terura minaco de la faŝismo k la milito. Ĉu ni staradu ekster la reala vivo kiel ridinda sekto malinteligente palpante niajn statutojn, rigide konservante la malnovajn metodojn k opiniojn? Ne, k denove ne ! Io devas okazi k io ankaŭ jam okazas.

Grava afero estas, ke la du francaj LEA-oj nun unuiĝis en unu organizo. Per tio niaj francaj K-doj sekvas la glorindan tradicion de la franca laboristaro — unuaj el ĉiuj realigantaj la unuecon. Dua grava afero estas la refondiĝo de la komfrakcio en SAT. Tio signifas nenion malpli ol definitivan finiĝon de epoko en la lab. esp. movado.

Dum kvin jaroj daŭris la skismo. Dum tiuj kvin jaroj restis areto da komunistaj Gek-doj en SAT. Malgraŭ kalumniado ili fidele laboris, pacience atendis — k ne estis vana la atendado. Novaj Gek-doj alvenis, k hodiaŭ la areto sentas sin sufiĉe forta k kuraĝa por mem ekagi, por mem ion fari utile al nia komuna sopiro : Forigo de la multaj miskomprenoj, prepari la vojon al nepra unueco. Jam la renaskiĝo de la frakcio signifas morale multon — k niaj agado k kreskado faros la ceteron.

La celoj de nia frakcio do estas duspecaj : Unue, laŭ la statuto de SAT propagandadi nian lingvon ĉe nia partio kiam ajn kaj kiel ajn eblas. Komprenigi al ĝi k al la tuta laboristaro, ke esperanto servu kiel bonega kultur-armilo en la batalo kontraŭ la faŝismo k milito. Due, per sia nura ekzisto akceli la nepran kunagadon k unuiĝon de ĉiuj lab. esp. asocioj sur la bazo de la laborista esperantismo.

La statutoj de la frakcio trovu sian precizan formon en kunveno de pli malpli da frakcianoj, ekz. dum la venonta SAT-kongreso. Ĝis tiam ĝi estos gvidata laŭ supre nomitaj gvidlinioj kun vasta agadlibero ĉe la nederlandaj K-doj prizorgantaj la funkciadon.

Ĉiuj komunistemaj Gek-doj en SAT k la LEA-oj estas petataj subteni nian laboron per aliĝo k ĝis plue laŭvola kotizo. Iom post iom ni penu, ke nia partio diversmaniere k plej grave — *mone* subtenu nin.

Antaŭen, Gek-doj ! Per nia sincera agado ni konvinku ĉiujn malnovajn kontraŭulojn, ke nia vojo estas la ĝusta vojo por realigo de niaj komunaj idealoj. Ni volas, ke SAT denove prosperu same kiel ĝi prosperis antaŭ la duobla skismigo fare de IPE k ISE. Por tiu granda celo ni vokas al ĉiuj, ni vokas al vi !

Anoncu vin en niaj vicoj ! Faru proponojn !

Sekr. adr. : *Jovado*, Hoofdweg 103, II, *Amsterdam*. Paŭlo THORSEN (18.334).

SENNACIISTA FRAKCIO

Raporto pri la kunveno okazinta en Manĉestro (4.8.1936).

Tiun ĉi kunvenon partoprenis tridek Gek-doj. K-do Floro (Londono) prezidis. La kunveno atendis raporton de la sekretario k leteron de K-do Lanti, kiuj, bedaŭrinde, ne alvenis ĝustatempe. Tamen okazis interesa diskuto pri la principoj de Sennaciismo.

Oni konstatis, ke sennaciismo estas esence laborista ; tial la vorto kosmopolitismo ne estas sinonimo de ĝi. Kosmopolitoj povas esti k estas ankaŭ burĝoj ; sennaciismon alcelas nur proletoj, ĉar la burĝaro ne havas intereson pri malaperigo de l'naciismo. S-ismo efektiviĝas nur per konsekvenca utiligado de komuna lingvo (por ni, esperanto). Sed tiu lingvo (esp-o) devas esti konsiderata ne kiel nura helpa lingvo, sed kiel mondlingvo sin trudanta je la loko de la nunaj naciaj lingvoj, kiuj pli k pli fariĝus dialektoj kondamnitaj al iama malapero. La sennaciistoj devas batali unue kontraŭ naciismon, k ligite kun ĝi kontraŭ ĉian militon. Oni aludis al la fakto, ke la franca kom. partio lastatempe fariĝis tute naciema k patriota, edukante siajn anojn al integra naciismo.

Estis sugestite inviti famulojn kun parencaj ideoj, ekz. H. G. Uels (Wells), verki artikolojn, kiujn ni tradukus esperanten por « H-ulo » k « Senn. Revuo ».

Kelkan tempon post la kunveno alvenis letero de K-do *Bubo*, la sekretario. Li skribis, ke la cirkonstancoj devigas lin forlasi la oficon, ĉar li atendas alvokon al militservo. La Gek-doj, kiuj ankoraŭ ĉeestis en la kunvenejo, elektis kiel novan sekretarion de l'Frakcio K-dinon *Ruth Roberts*, adreso : 1, Caister Ave., Whitefield, *Manchester* (Anglio).

ESPERANTO-KLUBOJ ATENTU !

Laborista Esperanto-klubo de Stokholmo serĉas korespondadon komunan kun esperanto-kluboj en la tuta mondo pri vivkondiĉoj k politikaj cirkonstancoj en la koncernaj landoj. Adreso : *Laborista Esperanto-klubo, Arvid Gehlin*, Vanadislunden 2. D. *Stockholm*. Svedio.

Ĝustigo al la Kongres-protokolo

En « S-ulo » n. 445, p. 73, estas kelkaj malĝustaĵoj, kiuj povus krei miskomprenojn. Mi ne diris, ke « 90 % el mia LEA apartenas al la soc. dem. », nek ke « nia estraro volas doni sian subtenon al ĉiuj ekzistantaj lab. esp. internacioj ». La 90 % rilatis al la tuta dana laboristaro. Nia LEA estas 100 %-e socialdemokrata. Tio, al kio nia estraro volas doni sian subtenon, ne estas ĉiuj ekzistantaj lab. esp. internacioj, sed la kunlaboro inter ĉi tiuj.

Kiom longe ni sentas nin ligitaj al la Gotenburga Konvencio, ni nature *ne* subtenas aliajn esp. internaciojn ol SAT.

H. P. Frodelund, Odense (Danio).

SOVETIO

Reveninte post kelkjara malliberigo, mi dez. koresp. kun miaj malnovaj korespondintoj. K-do A. *Sidorov*, Sredne-Smolenskaja ul. 28, *Voronej*.

kripligas tute internaciajn nomojn; «lando» estas tro longa. Pli internacia sufikso ol «io» ne estas trovebla. La geografia k historia terminaro bezonas ĝin. Se mi ĝin ekenkondukis nur en 1918, tio estas, ĉar la momento ŝajnis al mi tiam pli favora pro la apero de multaj landnomoj k ankaŭ pro la malpli granda rezisto de la tradicio je tiu ŝanĝepoko. Ke mi ne atendis unuaniman k tujan aprobon, mi tion antaŭsciis. Se mi estus atentinta nur pri mia persona avantaĝo, mi estus nenion farinta. Sed ĉiu progreso, eĉ progreseto ne estas atingebla sen rezisto k sen batalo, nek ankaŭ sen personaj malagrablaĵoj. Mi scias, ke estas pli facile protesti ol labori, k plian fojon niaj Parizaj samideanoj tion pruvis al mi ! Sed la lasta vorto ne estas dirita.

Pro troeco de laboro mi ne povis pli frue respondi vian leteron de la 8.1.20. Senkulpigu ! Pri progresoj de Esp. en Rusio vi povos legi kelkajn novaĵojn en la februara n-o de « Esperanto » k utiligi ilin por via agado. Bedaŭrinde niaj informoj estas nesufiĉaj k neregulaj, sed eble tio baldaŭ ŝanĝiĝos.

En Finnlando la Esp. movado estas prospera ĉe nesocialistoj k la Idista ĉe la socialistoj; en tiu lando ambaŭ partioj vivas tute aparte, k sufiĉas, ke la nesocialistoj ion akceptas, por ke la socialistoj akceptu la malon, k inverse. Ekzistas preskaŭ nenia kontakto inter ambaŭ.

Mi esperas, ke via laborista movado progresas. Ĝi ŝajnas al mi la sola nuntempa realaĵo en Francio. El korespondaĵoj ricevitaj el kelkaj Francaj urboj, mi havas la impreson, ke multaj malnovaj Esp-istoj ne kuraĝas rekomenci publikan agadon, pro timo de la gazetistaj kritikoj (1). Ĉar mi parolas pri gazetistoj, ĉu vi povas diri al mi, kial neniam aperis io por Esperanto en « L'Humanité » (2). Ĉu iu en ĝi estas kontraŭa al Esperanto ? — Mi estis iam sugestinta al Romain Rolland aperigi en tiu gazeto pledon por Esp., sed bedaŭrinde mia deziro ĝis nun restis sen plenumo…

Kun samideana saluto H. HODLER

(1) En tiu tempo esp-o en Francio estis duonneleĝeca, ĉar ĝi estis prezentita de la reakcia ministro L. Berar (*Bérard*) kiel instrumento de komunistoj, k ĉio, kio estis komunista, estis akre kontraŭbatalata de la tiama registaro.— *Red.*

(2) « L'Humanité », socialista gazeto fondita de *Jores*, post la skismo (en 1920) transiris en la manojn de l'bolŝevikoj, kies centra organo ĝi restis ĝis hodiaŭ. Ĝi preskaŭ ĉiam havis malfavoran sintenon al esp-o. Tamen K-do Lanti, persone klopodante, atingis, ke en ĝi aperis la Letero de R. Rolan (Rolland) al la 2-a SAT-kongreso k poste regula rubriko pri-esperanta, duonkolona k dusemajna. Nuntempe ĝia sinteno al esp-o plue estas tute malfavora, k eĉ la IPE-anoj ne sukcesis aperigi en ĝi iajn pli gravajn artikolojn. — *Red.*

RECENZEJO

G. Dimitrov: La Laborista Klaso kontraŭ la Faŝismo. Tradukis V. Kolĉinski Eld. Ukraina Eldonejo de Naci-Minoritoj, Kiev. 1936. — 174 pĝ. Form. 13 × 17,5. Prezo neindikita.

La libro entenas la raporton faritan de Dimitrov pri la ofensivo de l'faŝismo k la taskoj de Komintern en batalo por la unueco de la lab. klaso kontraŭ la faŝismo. Ĝin legante, ni pli bone komprenas la sintenon de la komunistaj K-doj, en la nuna tempo, rilate la unuecproblemon, ankaŭ sur la lab. esp-ista kampo. Oni ankaŭ pli bone komprenas la nunan liberalan sintenon de la komunistoj en kelkaj landoj,ekz. Francio, k ilian sintenon rilate la naciismon. « Ni ne estas adeptoj de l'nacia nihilismo », diras Dimitrov, « k neniam devas elpaŝi kiel tiaj. » Li opinias, ke la estonta proleta kulturo restos *nacia* laŭ la formo. Kaj... « la socialista revolucio signifos la *savon de l'nacio...* » Legante tion, oni ankaŭ komprenos, kial IPE-anoj tiom insistas pri la nura *help*lingva karaktero de esperanto k ĝia utiligo esence por taskoj, kiuj ne substrekas ĝian idean valoron. N. B.

SERVISTO JERNEJ K LIA RAJTO. Dramkolektivo de *Ferdo Delak* laŭ samnoma rakonto de *Ivan Cankar*. Esperantigis *Fr. Modrijan*. Ilustraĵoj de *Ravnikar*. 1936. — 28 pĝ. Form. 12 × 19. Prezo: 8.— dinaroj plus 0.50 d. por afranko. Mendoj al Esp. Klubo en Ljubljana, Delavska Zbornica. Poŝtĉeko: 14.463. Eksterlande tri resp. kuponoj.

La historio de maljuna laboristo, kiu serĉas juston k rajton en la kapitalista socio. La simboleca rakonto estas potencigita per la intervenoj de parolĥoro sur scenejo. Unuafoje esplingve prezentita de lab. esp-istoj el Ljubljana okaze de la ĉi-jara kongreso jugoslava esp-ista, ĝi rikoltis grandan aplaŭdon. Certe ĝia efiko dependas de la lerto de l'prezentantoj k de la scenaranĝo. Rekomendinda al teatro-grupetoj. Bedaŭrinde preseraroj estas multaj.

INTERNACIA FOIRO DE MARSEILLE. (19. sept.-5 okt. 1936). Afiŝo k glumarkoj. La Foiro korespondas ankaŭ en esp-o. Adreso: Foire Internationale, Esperanto-Fako, 7. Quai des Belges, *Marseille*.

LEO BELMONT: Jak Nauczyc sie Esperanta? (Kiel lerni esperanton?). Pollingva propaganda broŝuro de la konata esp. aŭtoro; ĝin eldonis « Lingvo Internacia » — eldonejo (Marszalkowska 81 m. 33, *Warszawa*). 16 paĝoj plus kovrilo. Form. 15 × 21. Prezo: 0.30 zl. La broŝuro entenas gramatikan analizon de lab. kantoj k modelon pri memor-ekzercoj. Kun reklamo pri SAT-eldonaĵoj.

EDITURA UMANITATEA (str. dr. Istrati 10, Bukaresto) aperigis libreton rumanlingvan de la esp-isto *I. Ionescu-Capatana* (32-paĝan) kun biografioj pri R. Rolland, Luiza Michel, Domela Nieuwenhuis, Errico Malatesta. La materialo grandparte estas tradukita el *Sennaciulo*.

Nenia paco sen la revolucia renverso de l'kapitalismo

« Ĉiu partio deziranta aparteni al la 3a Internacio havas la devon denunci same la malkaŝan socialpariotismon kiel la hipokritan k malveran socialpacismon, elmontri sisteme al la laboristoj, ke sen la revolucia renverso de l'kapitalismo neniu internacia arbitracia tribunalo, neniu konvencio pri armilreduktado, neniu « demokrata » reorganizo de l'Ligo de Nacioj liberigos la homaron el imperiismaj militoj. » (6-a kondiĉo de aliĝo al la Kom. Internacio).

Gvidlinio de Lenin... kiu meritas esti revokata en la memoron de l'hodiaŭaj « real-politikistoj ».

Ekster nia movado

La 28-a Universala Esperanto-Kongreso okazis en Vieno (Aŭstrio) de la 8a-15a de aŭgusto, sub la protektado de l'ŝtata prezidanto V. Miklas. La Viena ĵurnalo « Reichspost » (tre katolika) ĉiutage portis tutan paĝon en esp-o, kun raportoj pri la kongreso. La inaŭguro okazis en la festsalonego de « Neue Burg » (Nova Kastelo). Havis lokon akcepto en la urbdomo k lekcioj de la Somera Universitato. En la laborkunsidoj estis ĉefe nur pridiskutata la temo: transloĝiĝo de UEA el Ĝenevo al Londono, pri kiu punkto ne povis okazi interkonsento, ĉar kelkaj svisaj esp-istoj insistas pri restigo de UEA en Ĝenevo. Oni diris al ni, ke tiu ĉi kongreso ne estis pli bone organizata ol tiu de l'antaŭa jaro en Romo, k ke multaj plendoj aŭdiĝis pro organizaj fuŝoj.

La Universitata Rondo Esperantista (Ljono, Francio) entreprenis enketon ĉe franclingvaj eminentuloj, por scii kion ili pensas pri la enkonduko de esp-o en la unuagradaj lernejoj ĉe la lasta lernjaro k por peti ilian apogon al la propono. La cirkulero estas subskribita de la socialista deputito *A. Philip*, profesoro de la jura fakultato en Ljono.

La neŭtralaj gazetoj anoncas la starigon de nova asocio anstataŭ la jure nekonkerebla U.E.A.; ĝi havas la titolon: *Internacia Esperanto-Ligo*. Sidejo en Londono. La organo nomiĝos « Esperanto Internacia ». Ankaŭ « Heroldo » (post reaperigo en januaro) estos oficiala organo de la Ligo. S-ro Goldsmith (elektita kiel direktoro de UEA) nomiĝos ĝenerala sekretario de IEL. La strukturo (bazita sur la landaj asocioj) estas tiu de la *novdata* UEA(*internacia*, ne *universala*).

Propagandkomitato en *Kimrio* (Britio) aranĝas konkurson favore al partopreno en literatura k muzika festo (1937). Premio de 5 pundoj por la plej valora traktaĵo pri « Esp-o kiel komprenigilo inter la nacioj ». Numero de l'konkurso « 30 ». Ĉiu verkaĵo devas esti manskribita, maŝinskribita aŭ presita sur unu flanko de l'papero (folio 30 × 20 cm). Lasta dato: inter 22. aprilo k 1. majo 1937. Pseŭdonima subskribo. Vera nomo k adreso en aparta sigelita koverto kun la konkurs-n-o k la pseŭdonimo. Sekretaria adr.: S-ro *J. Rhys Lewis*, Eisteddford Office, *Machynlleth*, Mont., Wales (Britio).

SENNACIECA REVUO

La oktobra kajero enhavas multajn originalajn artikolojn, raportojn, kritikojn, ktp., i.a. el *Hispanio*, Palestino, Germanio.

Granda literatura k scienca parto

16 paĝ. Ilustrita. Unuopa n-o: 2.50 fr. fr.

SAT, 67, avenue Gambetta, Paris 20

MEMORNOTO

PRIESPER. ARTIK. K NOTOJN ENHAVIS: *Signalen*, Stokh., 13., 20., 27.8., 3., 10., 17., 24.9., 1.10.; *O Barreiro*, 9.8 k *Republica*, Lisbono, 7.8. (pri vizito de K-do Lanti en Barreiro); *Verdad*, Valencio, n. 19 (aŭtogramo de esp. letero de Mangada); *Industr. Worker*, Chicago, 5.9.; *United Progressive News*, Los Angeles, 7.9. (intervjuo kun K-do Ege).

PRI LA SAT-KONGRESO ENPRESIS: *Socialdemokraten*, Odense, 12.9. (ilustr.); *Our Circle*, sept., *Women's Outlook*, sept.; *The Cab Trade News*, *The Record*, *M.C.O.D.A. Gazette*, *Paisley Daily Express*, *Ilford News*, *Typographical Circuler*.

Korespondado

ARGENTINIO.

K-do *Arimondo Fulgenzi*, str. Misiones 369, *Buenos Aires*, petas siajn gekorespond. ĉesigi la koresp. kun li, ĝis la sendo de nova adreso.

AŬSTRIO.

K-do *Karl Hansl*, Thaliastr. 75, 1/11 16, *Wien XVI*, volas interŝanĝi PI k fotojn kun K-doj el ĉiuj landoj. Certe respondos.

K-do *Heinrich Hampeis*, Gablenzgasse 106, Stg. 7/1, *Wien XVI*, dez. interŝ. PI k fotojn kun ĉiulandaj K-doj Resp. certa.

ESTONIO.

K-do *J. Mukk*, Kauba t 5, *Viljandi*, dez. interŝ. PM kun transmaraj landoj, precipe Palestino. Nepre respondos.

HISPANIO

K-do *M. Sala*, el *Olot*, kiu anoncis en aŭgusta « S-ulo », bedaŭras, ricevinte multe da korespondpetoj, nun ne povi respondi, ĉar li troviĝas kiel kuracist- helpanto ĉe fronta hospitalo.

NEDERLANDO.

Esp. grupo da gelaboristoj dez. korespondadon kun Gek-doj el ĉl. Skribu grandnombre al K-do *W. A. van Toor*, Kortlandstr. 6 r, *Krimpen a.d. Ysel*. Certa respondo.

K-do *J. Poelhuis*, Kobstederstr. 22, *Winterswijk*, 34-jara, dez. interŝ. L, PI k ilustr. gazetojn kun ĉiul. Gek-doj. Nepre respondos.

K-do *J. H. Blom*, B. H. Heldstr. 12, *Winterswijk*, dez. interŝ. L k ilustr. gazetojn kun ĉiul. Gek-doj. Respondos nepre.

Laborista Esp. Sekcio deziras korespondi kun Gek-doj tutmondaj pri diversaj temoj. Nepra respondo. Adr.: K-do *Jb. Sandstra*, L. Tuinstr. 7, *Enkhuizen*, N. H.

Mi interŝanĝas 50-300 poŝtmarkojn kun ĉl. Adreso: K-do *P. B. Stengs*, *Haarlemmerdijk* 41, 11, *Amsterdam-C*.

Mi volas interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn, kun propaganda celo. Sendu amase! — Adreso: *R. Schroevers*, Eedestr. 15, *Vlissingen*. Garantias respondon.

Du K-doj deziras koresp. pĉt. kĉl. Resp. gar. Adreso: *W. v. Merkesteijn*, Agatha Dekenstr. 19, 1, *Amsterdam*.

Du junaj K-doj dez. kor. kun junaj Gek-doj el ĉ.l. Skribu al: *D. Bezem*, Dahliastr. 55, *Den Helder*.

3-a Lab. Olimpiado, Antverpeno 1937

La K-doj kiuj alsendis ekspozici-materialon, estas petataj pacienci ankoraŭ iomete. La esperanta broŝuro pri Antverpeno ankoraŭ ne pretiĝis.

... ...

AŬSTRIA SENLABORULO (SAT-ano), komerc-oficisto maldungita post pli ol 14-jara deĵoro, vidante neeblon rericevi oficon en Aŭstrio, havante familion, petegas, pro granda mizeriĝo, pri helpo el eksterlando. Skribi pere de SAT-redakcio.

Se vi ŝanceliĝas pri la korekta uzo de iu esperanta vorto, vi nur bezonas konsulti la

Plena vortaro de Esperanto

eldonita de SAT (2-a eldono, 512 paĝoj, form. 14,5 × 20 cm. Prezo: 60.— fr. fr. *plus afranko rekomendita*; por SAT-anoj la propra ekzemplero por 54.— fr. fr. afrankite).

En ĝi la senco de ĉiu esp-a vorto estas detale klarigita per la helpo de multnombraj ekzemploj.

SAT, 67, avenue Gambetta, Paris 20.

K-dino *T. Timmer*, Rosend. str. 486, ARNHEM (Nederl.) petas pri sciigo, ĉu iu vizitinto de la manĉestra kongreso trovis eble arĝentan pilkon, kiun ŝi perdis okaze de sia kongresvizito.